

Esperantista

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Jazykové potíže v Radě bezpečnosti.

Překládáme z anglické části čas. *American Esperantist* (červen 1946) tento stále aktuální článek.

První souhrn detailnějších zpráv a kritik obdržel vedoucí anglický tlumočník Bezpečnostní komise Spojených národů od paní v Los Angeles, jež mu gratulovala za jeho znamenitou práci překladatelskou, která umožňuje milionům, aby u svých přijímačů sledovali postup jednání, a zároveň naléhavě doporučovala, aby Rada bezpečnosti šetřila časem a odstraňovala jazykové svízele, užívajíc esperanta. To jest však jen jeden z mnoha případů, kdy státníci, novináři, rozhlasoví hlasatelé, lingvisté, narážejí na potíže jazykového problému od toho okamžiku, kdy Rada bezpečnosti organizace spojených národů zahájila své zasedání v Novém Yorku.

Na shromáždění studentů Hunter College byla na příklad podrobena podrobné kritice jazyková praxe v Radě bezpečnosti. Bylo vysloveno mínění, že sluchátkový systém (Filine-Finlay Speech Translator), jehož bylo užíváno v norimberském procesu nad válečnými zločinci, bylo by nejlepší cestou k urychlení jednání. Bohužel, faktor časový není jediný, o němž se musí uvažovati. Sekretariát Organizace spojených národů rozhodl, že nelze překládati nedbale nebo neznale, ale že je třeba dbáti hledisek přesnosti, odbornosti a politiky. Je na příklad velmi pochybné, že by muž tak nedůvěřivý k překladům, jako je sovětský delegát Andrej A. Gromyko, byl uspokojen anglickými překlady svých řečí podávaných sluchátkovým systémem, mluví-li sám rusky. Sleduje velmi anglický překlad a pozastaví každé slovo, jež se mu zdá nepřesné nebo nevyhovující.

Když se diskutovalo o otázce iránské, prohlásil pan Gromyko, že bylo v ní docíleno »soglasie« mezi Ruskem a Iránem. Když francouzský překladatel, jenž mluvil hned po něm, přeložil toto slovo jako »accord«, neměl Gromyko námitek (snad proto, že nerozumí francouzsky). Ale když anglický překladatel tlumočil to slovo jako »agreement«, protestoval a naléhal, aby bylo přeloženo »understanding«. V pozdější diskusi pan Gromyko užil slova »dogovor«, což je silnější než »soglasie« a je uvedeno v slovníku vyšlém v Moskvě ve významu »pact« nebo »treaty«. Tlumočník, který si vzal pozastavení k srdci, přeložil toto také »understanding«. V tomto případě nebyla zřejmě základní potíž v lingvistice, ale v politice. Přes to lze však snadno pozorovati, jak svízele řečové mohou komplikovati a ztěžovati politické dispute.

Na londýnské konferenci Spojených národů ruský delegát, zástupce lidového komisaře, A. J. Vyšinsky, byl ještě nedůvěřivější než pan Gromyko. Zdálo se, že mu přichází zatěžko věřit, že Angličan mohl by věrně překládati jeho trpké kritiky britské politiky. Trval s počátku na překladu věty za větou (což je krajně namáhavé pro tlumočníka i posluchače), později souhlasil s překládáním odstavce za odstavcem (což je dosti nepřesné).

Pročpak, mohl by se někdo ptáti, mluví pan Gromyko vůbec rusky? Jeho angličtina je docela dobrá, o hodně lepší než angličtina nebo francouzština leckterých členů rady. Jsou zde patrně dva důvody, aby mluvil rusky. Jeden je otázka prestiže: Mluví-li zástupci Spojených států, Velké Britannie a Francie, každý svým jazykem, ruský delegát chce ukázati, že má totéž právo. (Zdá se přes to, že ruština není jeho mateřštinou — je v ní něco názvuku běloruského.) Druhý důvod je psychologický. Ruský

Příklad úhlu 6.

Marx mem, malgraŭ¹⁾ tio ke li tute malatentis la moralan vidpunkton²⁾ kaj ke li vidis la motivojn de la homa agado en motivoj³⁾ materi(al)-aj, estis per sia vivo servanto al⁴⁾ la granda idealo morala — la liberigo de la vastaj tavoloj⁵⁾ de la laboranta popolo⁶⁾ el la subpremado kaj ekspluatado.⁷⁾ Li mem en sia vivo ne sekvis la materi(al)ajn celojn, eĉ ne persone, sed servis al sia morale allestaranta idealo. La praktika vivo de la komunistaj partioj altrudis al ili⁸⁾ pluajn cedeojn,⁹⁾ ekz. for'ason de la morale indiferenta vidpunkto pri firmeco de la familio kaj la novan plifirmigon de la familiaj ligiloj en Ruslando, la altan ŝaton de la fideleco kaj lojaleco al la partio,¹¹⁾ la batalon kontraŭ krimeco, vagabondeco, mallaborado k. a. La plua evoluo de la komunistaj partioj iros en la direkto de akceptado¹²⁾ de pluaj moralaj konsideroj en la programo de agado¹³⁾ kaj en la politikan praktikon, ĉar la forto de la socia situacio eldevigos al si¹⁴⁾ pluan respekton al la kondiĉoj mem de la socia vivo, inter kiuj unualoka estas¹⁵⁾ la sistemo de moralnormoj. Problema¹⁶⁾ restas sole la morala sfero,¹⁷⁾ troviĝanta super la normoj, kiuj eĉ en la politika praktiko sin mem altrudas.

Ĉu politika partio lasu flanke de sia politika celado ĉiujn pli delikatajn moral-normojn kaj la pli altan moralan strebadojn?¹⁸⁾ Ĉu ĝi povas rigardi¹⁹⁾ sian taktikon nura ŝakludo sen atento²⁰⁾ al la moralnormoj de sia socio?

Laŭ nia konvinko, moderna partio ne devas, sed eĉ ne povas kontentiĝi per tia minimumo de moralaj normoj altruditaj per la forto de la situacio,²¹⁾ kaj ignori ĉiujn aliajn. Ĝis nun neniam la politikaj partioj havis en sia programo celojn tiom vastajn kaj tiom riĉajn, kiel la modernaj partioj politikaj kaj ĝis nun neniam ili havis tiom multajn kaj tiom fortajn kaj efikajn rimedojn por atingi tiujn celojn.

La modernaj politikaj partioj influas²²⁾ per sia programo ne sole al la mallarĝe²³⁾ limigita vivo publika, sed al ĉiu alia parto de la socia vivo, antaŭ ĉio la ekonomian vivon, la soldatan kaj la antaŭsoldatiĝan edukon, ili edukas sian propran junularon, havas sian kulturan programon, iuj eĉ havas siajn historiistojn, siajn filozofojn, ili influas la edukadon

lernejan, administradon de urboj, koncize, ĉiujn sferojn²⁹⁾ de la socia vivo.

Dum³⁰⁾ la politikaj partioj celis³¹⁾ la problemon dinastian, la politikan liberecon, la forigon de la malegaleco de civitanoj kaj similan celon, ilia agado limiĝis preskaŭ nur je la kampo publika kaj politika. Eĉ se en la publika vivo³²⁾ ne estis ebla³³⁾ absolute ignori³⁴⁾ la mondon de moralaj valoroj (iuj politikaj celoj, ekz. la libereco de civitanoj, havis nepran moralan enhavon), ĝi estis pli facila ol en la tempo moderna. Nuntempe, kiam la politikaj partioj (per sia agado) influas la grandan parton de la socia vivo, la apartigado de la politika agado for³⁵⁾ la morala celado havas sekvojn³⁶⁾ multe pli gravajn. Se en preskaŭ ĉiuj partoj de la publika vivo intervenas mano³⁷⁾ morale indiferenta, tio kondukas al malaltigado de la morala nivelo preskaŭ de la tuta socio.

Poznámky:

- 1) malgraŭ ĉiu malatento al la morala vidpunkto; malgraŭ ĉiu ĉiu preterlaso de...; malgraŭ ĉiu ĉiu neglekto de...
- 2) i v češtině by bylo správnější: Marx přesto, že pomíjel... a že spatřoval důvody, místo těžkopádného přes spatřování důvodů,
- 3) instigoj, kaŭzoj,
- 4) de,
- 5) i v e. se říká nejen tavolo da neĝo, ale sociaj tavoloj, laborula tavolo,
- 6) laboruloj, laborantaro,
- 7) velmi pěkné - ekspluataĉo,
- 8) la praktiko,
- 9) říká se: trudi al iu tedan taskon, sian opinion, altrudi sian volon (Z.), siajn dezirojn al iu (Z.), al trudita feliĉo estas ofte malfeliĉo; zde též: eldevigi al si,
- 10) ne: koncesio = privilegio, rajto donita de ŝtato por ekspluatado: por vendi tabakon aŭ alkoholon oni bezonas en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj koncesion (PV),
- 11) de partiaj fideleco kaj lojaleco,
- 12) Méně těžkopádné: Dum sia evoluo la ...partioj akceptados pluajn moralajn konsiderojn,
- 13) agoprogramon, agad-programon,
- 14) trudos al ili,
- 15) inter kiu unualoke troviĝas, unuavice staras,
- 16) jasnější než: problemo restas,
- 17) jedná se o mravní oblast ležící nad normami, které se vnucují samy sebou,

zástupce nemohl by mluvit anglicky s touž přesností a výmluvností, jako mluví rusky a jak britský a americký delegát mluví anglicky. Užívání angličtiny zatlačilo by ho na nižší stupeň v diskusi s jeho kolegy.

Otázka prestiže je vinna též na tom, že Rada bezpečnosti nemá »oficiální« jazyk, ale toliko jazyky »pracovní«: angličtinu a francouzštinu. To znamená, že všechno se tu musí překládati do těchto dvou jazyků a všechny doklady v nich předkládati. Je to dosti složité, ale přece jen ne tolik, jako kdyby se musilo k tomu užívat ještě ruštiny, španělštiny a čínštiny.

Všichni delegáti, vyjma pana Gromyka, vynasnažili se ze všech sil, aby šetřili časem a úsilím, mluvíce anglicky nebo francouzsky. Bylo tu však přes to mnoho překážek. Jeden z tlumočnicků Spojených národů řekl vydavateli American Esperantist, že, některým delegátům je tak těžko rozumět, že překlad je více méně konjektura. Mexickému delegátu, panu Dr Francisco Castillo Najeraovi, nesporně velkému řečníku ve španělštině, je velmi špatně rozumět, mluví-li francouzsky. Naštěstí není tak úzkostlivý na detail a tlumočnické konjektury jsou jím přijímány jako doslovný překlad.

Francouzské tlumočnický několikrát rozbolela hlava z angličtiny austrálského delegáta, podplukovníka Williama Roy Hodgsona. Byli velmi vděční svému zcestovalému anglickému kolegovi, který jim šeptal do ucha, když podplukovník mluvil. Dělal vše, co bylo v jeho moci, aby převedl »dolní« angličtinu na oxfordskou výslovnost, na niž byli tlumočníci zvyklí.

Jazyková otázka, jež působila zmatky v Radě bezpečnosti, jevila se ještě naléhavěji v shromáždění Spojených národů v září v Novém Yorku. Naštěstí vzrůstá tam počet mužů a žen, kteří již došli k přesvědčení, že se musí ve věci něco vykonati. Jednou z nich je paní Eleanor Roosevelt. Vzpomenula těchto zkušeností opět, když mluvila na shromáždění vyšší školy novin New York Herald Tribune, 13. dubna 1946. Prohlásila: Nyní se došlo k přesvědčení, že nejlepší věc, jež by se mohla učiniti pro mír, bylo by nalézt jazyk, — a já znám politické obtíže toho — ale kdybychom mohli prostřednictvím Spojených národů vybrati jazyk společný pro celý svět, jemuž bychom se všichni učili vedle svého jazyka vlastního, to by bylo velkým příspěvkem pro lepší dorozumění se v budoucnosti. Jazyková hráz je jedna z věcí, jež na mne útočily opět a opět... Žádný tlumočnick nemůže vám říci dosti dobře, co si povídají lidé okolo vás. Nuže, mladí lidé, zkuste přijít k nějakému dorozumění, že každý z vás bude se postupně učiti jednomu jazyku, s nímž bude moci mluvit bez tlumočnicka jeden s druhým. Čas je zralý, aby se předložila Spojeným národům a všem lidem na celém světě fakta a důvody pro neutrální, přesný, snadný pomocný jazyk, esperanto. S. K.

Vortoj kaj esprimoj el milita kaj postmilita tempo.

Ni prezentas la unuan malgrandan liston de vortoj, pri kiuj ni parolis sur paĝo 54. Ni daŭrigos tiajn listojn kaj petas la legantojn pri kunlaboro.

Domovní prohlídka

domtraserĉo (P)

Evakuovati

evakui 1. Malplenigi lokon, regionon.
2. Forigi el loko, regiono.

Chlebový lístek

pankuponaro

Kmenový list

distribua ĉefkarto, distribua matrikulo. (P)

Kolaborant

kolaboratoro, kunlaboranto kun malamikaj invadintoj (P)

Koncentrační tábor	<i>koncentra kampo</i>
Koncentrák	<i>koncentrejo</i>
Místní osvětová rada	<i>loka kleriga konsilantaro</i>
Nacismus	<i>naziismo</i>
Nacista	<i>naziisto, naziano</i>
Národní soud	<i>Nacia tribunalo</i>
Lidový soud	<i>Popola tribunalo</i>
Okupace	<i>okupado, okupacio</i>
Okupant	<i>okupanto, okupacianto (?)</i>
Organisace spojených národů	<i>Unuiĝinta Naciara Organizo</i> («Esperanto»)
Plný zásah	<i>plentrafo (P)</i>
Podzemní hnutí	<i>subtera movado</i>
Pracovník	<i>laborulo</i>
Protiletický kryt	<i>kontraŭbomba rifuĝejo (P)</i>
Razzie	<i>razio</i> (neologismo jam sufiĉe internacia). (P)
Raketa (zbraň)	<i>raketo</i> (armilo) (P)
Raketa (pro tennis)	<i>rakedo</i> (por teniso) (P)
Usměrnění	<i>samdirektigi, egaligi</i>
Ústřední rada odborů	<i>Centra Estraro de Sindikatoj</i>
Zaplynovati	<i>gasumi (P)</i>

Remarko: (P) indikas, ke la vorto estas rekomendita en »Progresanto«. La radikon »nazi« uzas ofte »Esperanto«.

EKZAMENA KOMISIONO de la Esperanto-Asocio en ĈSR

kunsidos en Praha

la 29-an de marto 1947.

Aliĝojn sendu al sekretario de la Komisiono JUDr Tomáš Pumpř en Praha-Břevnov, Bělohorská 1404.

En februaro aperos unua numero de tria periodo de la eminenta revuo

LITERATURA MONDO.

Ĝi daŭrigos sian novan vivon sub la sama gvido de

K. KALOCSAY kaj J. BAGHY.

Ĝi aperos en amplekso de 16 paĝoj, 29x20.5 cm, monate (komence en duoblaĵ kajeroj).

Abono por jaro Kčs 125.— pagebla al pŝp konto nro 9.602 de Svaz esperantistů en Praha.

- 18) Zamenhof: strebi al iu celo. Ekzistas homoj kiuj de tempo al tempo sentas strebadon al poezio; téz klopodon, penadon,
- 19) vidi en sia taktiko nuran ŝakludon,
- 20) sen respekto al...; ne atentante la moralnormojn...
- 21) cirkonstancoj,
- 22) kaj per ignorado (neglektado, malatentado) de ĉiuj ceteraj,
- 23) sin intermetas en la vivon publikan,
- 24) malvaste,
- 25) regionojn, kampojn,
- 26) dokud = po tu dobu, co... en la tempo kiam. Dokud budu živ = dum mi vivos, dum mia vivo. Dokud budeme mít zásoby = Dum ni havos la provizon, dokud = ĝis jen v českých větách záporných: Počkám, dokud nepřijde = Mi atendo; ĝis li venos (= mi atentos, de nun ĝis la tempo, kiam li venos),
- 27) stranám ŝlo o něco = la partioj celis ion. Al partioj tem is se zde nehodí. Temi = 1. havi kiel temon, na př. la diskuto temas pri ŝanĝo en la regu'aro. 2. (bezpodmětné) = la temo, la demando estas pri la afero, koncernas la aferon: Ne temas nun diskuti pri tio, sed agi por tio. En tiu ĉapitro temas pri io tute alia. Temas ĉu ni venkos aŭ ne. Mně ŝlo o něco = Mi celis ion (ĝi estis mia celo, ne temo),
- 28) i v češtině by bylo stačí'o: i když ani ve veřejném životě nebylo možno... Ale chcete-li doslova, tedy stejně neobratně i v esperantu: sur la kampo de la publika vivo,
- 29) ebla, rozumí se ebla afero,
- 30) tute malatenti,
- 31) dis de, apartigado de la politika agado dis de la morala celado,
- 32) konsekvencojn,
- 33) se oni intervenas per mano...

Překlady tohoto textu poslali: J. Bretnchneider Olomouc; MUDr Jos. Černý Litoměřice; Ant. Jandík Pardubice; Alois Košťál Trnovany; Fr. Kuba Olomouc; Jarmila Kubásková Staňkov; Pastro Macek Pulgary; Juř. Procházka Rajhrad; Ing. Jaromír Rebiček Havlíčkův Brod; Jan Tabara Ostrava; Jan B. Vlach Praha; Božena Vlčková Kladno. Celkem dvanáct z našich čtenářů.

Do překladatelského odboru se přihlásilo na sto členů. Čím více překladů nám zaslaných, tím více práce pro nás. Přesto ale bychom rádi viděli, kdyby tito členové (a i jiní překladatelé) si nenechávali svoje překlady doma, nýbrž nám je zasílali.

Lokaj informoj.

Bojkovice. Místní osvětová rada (Loka Kleriga Konsilantaro) organizis kurson por 15 komencantoj. Malfermo 23. X., instruas s-ano Tichoň ĉiumarde je la 19—21 h. en la burĝlernejo.

Česká Lipa. Laŭ instigo de s-anoj Hanuš kaj Srb aranĝis ŬRO kurson. Post afiŝado kaj publika parolado de s-ano Prof. Kožený la 6. XI. aliĝis sole 9 p., sed en la unuaj lecionoj kreskis la nombro ĝis nun al 30 p. Malfermo 25. XI.; instuas ĉiumarde kaj ĉiuvendrede je la 19—21 s-ano Hanuš. La bonegan paroladon de s-ano Kožený ĉeestis kaj la kursaranĝon kunhelpis s-ano Špŭr.

České Budějovice. EK »La Progreso« malfermis la 1. X. kurson por 35 komencantoj. Gvidas s-o Hofhansel en la klubejo de hotelo »Slunce« ĉiumarde je la 19a—21 h.

Brno. 9. X. malfermo de kurso organizita de ŬRO kaj EK. 42 komencantojn instruas ĉiumerkrede je la 19—21 en ejo de ŬRO s-ano PhC Geryk. — 13. I. 1947 estas malfermata plua kurso en Vyšší škola lidová Komenského; gvidos lundon kaj jaŭdon s-ano Vondroušek.

Dobrovice. EK finis kurson kun 24. p. (Malfermo 17. IX. kun 19 p.) La kurso daŭras kiel perfektiza. Fondiĝis loka grupo de EACSR, prez. MUDr. Mersiĉ, vicprez. Vaněk, sekr. Zakoucká, distrikta peranto Semerádová.

Havlíčkův Brod. Kurso komencula komencis la 6-an de novem. ĉiunmerkredon, 19—21 h. en burĝa lernejo. Instruas Marie Heřmanská. La kurso estas en kadro le Popola lernejo.

Hradec Králové. Klubo elpendiĝis du kestojn en la urbo por informi samideanojn kaj urbanojn pri novaĵoj. En la stacidomo estas granda informtabulo nokte lumigita. Senditaj petskriboj al Distrikta kleriga konsilantaro kaj al Komerca ĉambro por subteni enkondukon de Esperanto en praktikon. Klubo regule sendas siajn reprezentantojn en la kunsidojn de la Loka nacia kaj Distrikta komitatoj. La »Amikaro de la klubo« kreskis jam al 163 membroj. La klubejon en la Stalinstrato ornamas bela tabulo de la klubo. Klubo eldonis serion de 10 belegaj vidajkartoj de la urbo kun verda ste'o kaj esperanta teksto. La 22. X. estis mal-

fermita unua kurso kun 33 partoprenantoj; gvidas ĝin s-ano Tich ĉiun mardon. Gastoj de la klubo: S-ano de Jong kun edzino el Nederlando, Ing. Berger el Potštejn, Dro Fousek el Přelouč, s-ano Vondráček el Česká Skalice kaj Anton. Jandík kun 3 samideanoj el Pardubice. Klubo de fervojistoj aranĝas kurson por 12 p. gvidatan de s-o Pytloun.

Chlumeck n. C. Kurson por 25 komencantoj aranĝis kaj gvidas s-ano Pytloun. Inter ili estas 6 ĝeinstruistoj (1 lernejdirektoro). La 15-an de okt. prelegis J. Vitek pri Svedio kaj esperantismo al 150 aŭskultantoj; la preleĝon aranĝis direktoro de la burĝa lernejo Ryba kaj r. p. Pytloun.

Klimkovice. La loka laboron helpis propaganda ekskurso de s-anoj el Ostrava. Ĝian bonegan organizon prizorgis la loka geedza paro Raška. Oni marŝis tra arbaro al monto apud loko Olbramovice, kie atendis abunda piknikregalo. Sur la montet-supro estis hisita e-a flago alloganta multajn preterpasantojn, kiuj demandis kaj ricevis informojn. S-ano Raška preparas nun fondon de loka grupo.

Liberec. Loka kleriga konsilantaro, Regiona estraro de sindikatoj kaj nia Loka grupo aranĝis en la Kulturdomo (Dům osvěty) la 17-an de oktobro Informan vesperon pri signifo kaj praktika uzo de Esperanto kiel helpa lingvo kaj la 24-an kaj 25-an de okt. ĉeĥan preleĝojn de J. Vitek: Svedujo per miaj okuloj. La eniro por la unua entrepreno estis senpaga, por la dua 10 Kčs: Ambaŭ havis tre bonan resonon. Suma vizito de la Vitek-preleĝoj estis unu mil lernejaĵinfanoj kaj plenkreskuloj. En la Informa vespero parolis s-oj direktoro Knížek, Ing. Fanta, Blecha, Novotný, Koutek. — Kurson aranĝas Loka grupo kaj ŬRO por 30 komencantoj; instruas s-ro K. Koutek, ĉefkonsilisto el Praha, nun loĝanta en Liberec.

Meziměstí u Br. Du preleĝoj de Josef Vitek pri Svedio kaj esperantismo, la 20-an de okt., al sume 300 ĉeestantoj.

Mladá Boleslav. Instruisto Raulvolf gvidas kurson por lernantoj de burĝa lernejo. Prof. Kožený gvidas kurson por skolttoj.

Olomuc. 15. X. malfermis kurson EK por 15 komencantoj. Instruas

ĉiumarde je la 18—19.30 h. s-ano Neužil en lernejo.

Háj u Opavy. Kurson por 10 p. gvidas s-o Vladimír Sláný el Ostrava, venanta tien ĉiusemajne per vagonaro.

Karlovy Vary. 29. X. organizis ŬRO kun EK publikan kurson por 15 komencantoj. Instruas lunde kaj vendrede je la 19—21, en la Lernejo por virinaj okupoj, s-ano Mlek. La nombro de partoprenantoj kreskis depost la malfermo. — 2. XII. malfermis kurson por 50 p. la Popo'partio, organizitan de s-ano Zvěřina. Instruas marde kaj vendrede je la 18—19 h. s-ano Jermář en la sama ejo. La partoprenantoj konsistas ĉefe el soldatoj kaj studentoj. La nombro ilia kreskas.

Plzeň. 3 kursoj: LUH (Lidová universita Husova = popolkleriga institucio) kune kun Okcident-Bohemiaj E-istoj malfermis 19. XI. kurson por 16 komencantoj. Instruas ĉiumarde je la 19—21 en ĉambro de burĝlernejo s-ano Gross. — »Kulturo« organizis kurson ĝeneralan por 12 lernantoj; instruas s-ano Patera ĉiuaŭde je la 19—22 en restoracio Hahn, str. Houskova, kaj Kurso speciala por biciklistoj: de post 3. IX. instruas 8 biciklistojn (supozeble estontajn mondvojaĝantojn) s-ano Patera en restoracio Strnad, urboparto Petřín.

Praha. La 30. XI. 46 okazis amika kunveno de la partoprenintoj de Someraj Esperanto-kursoj en Doksy. Ĉeestis 33 ĝesamideanoj el 8 lokoj, sendis saluton kaj proponojn 27 el 20 lokoj de ĈSR. En la kunveno, aranĝita de s-oj K. ŝo'c, A. Šanina kaj Dr Pitlík, preparo'is la laste nomita la temojn: »Graveco de la societema kontakto inter la ĝesamideanoj por la esperantista movado. Esperantistaj somerrestadejoj, ilia faka kursaro kaj societaj aranĝoj. Neceso de la daŭra esper. somerrestadejo en ĈSR kaj ĝia internaciigo. Internacia intersanĝo de la esper. somergastoj pere de la »Ferio Klubo« de IEL. Celo de la »Internacia amikeco'ligo« en Londono. Amerika kontakto de la opaj internaciaj esper. somerrestadejoj«. — La tiurilatan debaton partoprenis ĝes-oj Eo-háčová, Kouřil, Pytloun, Šlanina, ŝolc, Valeš. Decidite rel omendi la aranĝon de la somerrestadejo kaj faka kursaro en 1947 (denove) pro propagandaj celo'oj en taŭga loko kaj plilongigon al 14 tagoj. S-o Jandík

proponis la aranĝon ĉiujare aliloke, s-o Pyt'oun transdonis inviton de s-o Vondráček al Čes. Skalice. (La kunveno esprimis dankemon al s-o Šolc pro lia entuziasma aranĝo de la afero en Doksy kaj petis lin transpreni la aranĝon ankaŭ en la j. 1947 helpe de s-o Špŭr kaj la aliaj oferemaj gesamideanoj el Doksy. La amuzan programon par'oprenis ges-oj Slani-na, Konopová kaj Mařík. Multaj ĉe-estintoj esprimis la deziron aranĝi la kunvenojn de la »Doksanoj« pli ofte.

Ostrava. En Kunčičky komencis 10-an de novembro kurso por komencantoj. Oni instruas dimanĉe antaŭtagmeze en burĝa lernejo. La kurso antaŭiris propagando inter skolt-oj kaj krom tio la publiko estis informita per afiŝoj, flugfolioj kaj diapozitivo en loka kinejo. - La 8-an de novembro aranĝis s-ano Hanzelka en kvara burĝlerneja klaso propagandan paroladon kaj malgrandan esp-ekspozicion kiun ĉeestis 70 gelernantoj. — Dank' al lernejestro s-ro Aug. Opěla, kiu estas samtempe prezidanto de Loka kleriga konsilantaro en kies kadro la kurso estas aranĝata, la kurso bone progresas. Unuan horon ĉeestis 35, la duan 42 gekursanoj. Instruas laŭ Ĉe-metodo partopreninto de kursoj en Doksy s-ano Hanzelka. Post la kurso estas fondota esp. klubo en Kunčičky.

Klubo de Esperantistoj en Slezská Ostrava festis 25-an datrevenon de sia ekzisto. Festeno tre bone sukcesis, ĉar partoprenis multaj gastoj el ĉirkaŭa'o. Tre belan prelegon havis Alois Kubala pri historio de la klubo. Partoprenis 46 p. — La 9. 11. 1946 kurso por komencantoj starigita. — Klubanoj tre vigle korespondas kun fremdlandanoj. Tre interesaj leteroj el Ĉinujo, Australio, New Zeland kaj Suda Afriko mont-ras viglan intereson pri nia respubliko. — La 9-an de novem. vizitis rondeton s-o Vuk Echtner el Praha kaj faris prelegon, kiu tre kontentigis ĉiujn samideanojn. — En novembro fondis s-o A. Kubala novan lokan grupon »Komenský« en Zábřeh.

En Radvanice malfermis 4. XI. kurson kun 15 p. EK Nova Vivo. Instruas ĉiulunde je la 19—21 en burĝa lernejo s-anoj Staňura kaj Taraba. La nombro ĉe malfermo estis pli malalta, ĝi kreskis dum la daŭro de la kurso.

Pardubice. Ústav salesiánů (katolika Instituto Salesiana) malfermis

22. XI. kurson por 15 komencantoj; gvidas s-o Jandík, ĉiuvendrede je la 19—21 h. en la ejo de la instituto, laŭ Ĉe-metodo. Krome instruas private s-o Jandík kelkajn studentojn antaŭ la regulaj ĉiumerkredaj kunvenoj, okazantaj je la 20a en hotelo Veželka, str. Stalinova, klubejo II. Meznombre partoprenis ĝis nun 12 p. En la urbo estas propagandaj ekspozicietoj, ĉe la klubejo, en magazafenestro de s-ano Večeře kaj aliaj magazafenestroj, angulo de strato Stalinova, str. Sladkovského k. a. Ilin enhavon prizorgas s-ano Nálevka.

Stonava. Prez. de la loka klubo »Estonteco« estas s-o Bubík, sekr. s-o Popiolek.

Tábor. Esperantista vivo en la urbo bone evoluas. Estas samtempe aranĝataj 6 kursoj, en kiuj lernas Esperanton proksimume 200 homoj. La granda kurso estas en »Lernejo de laboro«, kiun partoprenas 34 lernantoj, en komerca lernejo estas 2 kursoj, kiujn vizitas 124 studentoj. 2 kursoj estas en gimnazio kaj unu por vizitantoj de kunvenoj en la loka grupo de nia Asocio. Loka grupo havas regulajn kunvenojn ĉiun mardon je la 19a en hotelo »Znamenáček«. La klubo havas nun propran propagandan kesteton sur la hotelo »Slunce«. De la 1-a de novembro estas aranĝita en du grandaj elmontraj fenestroj de »Zemědělská banka« publika ekspozicio de esperantista materialo. Estas tie montrataj libroj, lernolibroj, propagandiloj, poŝtkartoj ktp. En lokaj gazetoj estas regule represataj informaj artikoloj pri esperanto. Helpe de la loka gazetaro estas la publiko bone informita pri esperantista movado.

Třebíč. Lernejo popola por plenkreskuloj komencis la 4-an de oktobro E-kurson, kiun partoprenas 39 p.; Instruas prof. T. Kilián, vendredon 20—21.30 horo en la Komerca akademio.

Trutnov. Kurso por fervojistoj okazos, sub gvido de s-ano Šafránek.

Turrav. 4. XII. komis kurso. Gvidas s-ano Šolc.

Újezd u Sokolnic. Kurson por 22 gelernantoj en burĝa lernejo gvidas s-o instruisto V. Valčík.

Ústí n. L. 29. IX. laborkunejo, 7 p. el 5 lokoj; s-o Doubrava, Benešov n. Pl.; ges-oj Dušek, Ústí n. L.; Echtner, Praha; s-ino Hlaváčková, Přísečnice u Duchcova; s-o Lešák, Teplice-Šanov; s-o inĝ. Trejtnar,

Ústí n. L. Malfermis kaj gvidas s-o Dušek. Pri la movado ĝenerale parolis kaj laborplanon sugestis Echtner. S-o Dušek konigis la kondiĉojn lokajn. Fondiĝis Loka grupo de EAĈSR kun 20 membroj. Prez. estas s-o Fr. Mothejzík, vicprez. Dro Hrneček, sekr. Dušek. La grupo gvidas kurson por 16 komencantoj. Pluajn kursojn organizis Vyšší lidová osvětová škola (Supera popolkleriga institucio) kaj la Regiona radiostacio, kiu krome disaŭdigas E-prelegojn. Ankaŭ la regiona gazeto Sever aperigas artikolojn kaj kurson. Tri ekspozicioj en komercfenestretoj kaj propaganda kesto, zorgataj de s-ino Elena Dušková. La konferenco metis fundamenton por la renovigita regiona movado. Ĝia kunsido okazis domo de la Informministerio, str. Velká Hradební. La harmonian laboron finis vizito de la E-hejmo de ges-oj Dušek, kiuj invitis la alilokajn gastojn al bona tagmanĝo. Dank' al la laŭdindaj oferemo kaj fervoro de la gesinoroj Dušekoj kaj de ĉiuj ceteraj samlokanoj oni povas esperi tre bonan progreson en tiu ĉi grava nordbohemia metropolo.

La 9-an de okt. malfermo de tri kursoj kun sume 62 p. Ilin organizis Vyšší lidová škola kaj la Loka grupo de EAĈSR. Instruas: ĉiujauĉde je la 20—22 en la klubejo D o Hrneček kaj en du kursoj de VLOŠ ĉiumerkrede en lernejo samhore s-anoj Mothejzík kaj Dušek. Krome okazas kurso disaŭdigata de la regiona radiostacio ĉiumarde je la 18—18 15 de post la 1. X. La radiostacio disaŭdigas de post 1. XII. »Raportojn pri Esperanto«.

Valašské Meziříčí. S-o Šob anoncas malfermon de kurso komence de decembro.

Židenice. Kurso por 26 personoj gvidata de R. Nečas.

*Resendu petskribojn al UNO.
ĉe malplenajn, al
E-Asocio en Praha 47.*

Ni legis.

Heroldo de Esperanto ek de novembro aperas duonmonate. En numero el 15-an novembro ĝi sciigas, ke nombro de ĝiaj abonantoj atingis 1500 en 45 landoj. Nombro de landoj estas impona, nombro de abonantoj ne tro. Abonpago por jaro 1947

kostas 100 Kčs kaj akceptas ĝin nia administrejo en Praha 47.

SAT ne havas soci-politikan programon, nek planon por ordigi kaj pacigi la mondon, sed en ĝia kadro sennacieca prepariĝas necesa materialo konstrua, sen kiu neniam efektiviĝos io pozitiva rilate mondpacon (Sennaciulo, novembro 1946).

Morala respondeco. La interkonsento de la du grandaj organizaĵoj finiĝi la konflikton kaj kuniĝi la fortojn estas likvidacio de milito interna. Pensante je tio, ni devas ankaŭ likvidi iom post iom okazaĵojn dum militajn. Inter ili la helpagadon pri Familio Zamenhof instigitan de UEA, la servon de interhelpo. Poste la problemon pri morala respondeco de esperantistoj, kiuj partoprenis la nazi-agadon (Esperanto, sept.-okt. 1946).

Viajn gestudentojn kaj gejurulojn INTERŜANGOS EKSTERLANDEN

dum libertempo en jaro 1947

Arto-in Rauwolf,
F. D. (Junul-interŝanĝo) de IEL).
Ml. Boleslav II-672
Ĉeĥoslovakio.
Enmetu la poŝtmarkojn!

ABC-Tutmonda Adresaro daŭrigas sian aperadon. Eldonejo en Kra-

lovice u Plzně. Ciklostilita. En pluraj lingvoj. Informoj ĉe la eldonejo.

Samideáné, pomozte!

Dlouholetý esperantista, obchodník, který válečnými událostmi na Slovensku přišel o všechno, hledá v Čechách nebo na Moravě místo skladníka, expedienta, agenta ev. účetního. Vyzná se zejména v obchodě koloniálním.

Prosíme naše čtenáře o sdělení, mohou-li pomoci, na adresu Svazu.

BILDOJ DE DRO L. L. ZAMENHOF ĈETEBLAJ!

Esperantista klubo »La Progreso« en Ĉes. Budějovice, Šumavská 250. eldonis la bildojn de la majstro Dro L. L. Zamenhof (rektaj fotografajoj) por sekvantaj prezoj:

Poŝtkarto 9×14 cm . . . Kčs 7.—
18×24 cm . . . Kčs 40.—
24×30 cm . . . Kčs 70.—

La prezoj estas kalkulitaj sen afranko.

Korespondi kun ĉs. samideanoj deziras:

P. C. Couprie, Copernicustraat 128 DEN HAAG (Nederland), Studento 16 jara, precipe kun studentoj.

Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Post apero de la 8-a n-ro mi ricevis jenan ĵustigon de la Moraviaj Esperanto-Pioniroj en Olomouc:

»En la lasta numero de »Esperantista« vi indikis, ke la dramon R.U.R. tradukis Mastný, Kudela kaj Neuzil. Tion vi transprenis el la Esperanto-Bibliografio, kies redaktoro estis mitifikita de iu ĉeĥa samideano, kiu ne informinte sin, laŭ propra bontrovo faris maĝustan indikon al li. Vian laboron ni tre ŝatas kaj vo'as do, ke Vi estu ĝuste informita. MEP estis du olomoucaj entuziasmuloj, junaj studentoj, kiuj en la epoko, kiam profesoro Fierlinger kun sia familio helpis al pioniroj Ĉejka kaj Krumpholz, komencis eldonadi vidajojn kaj fine eĉ verketon: Esp.-movado en Moravio. La jaro 1914 ĉesigis ilian laboron kaj post la milito restis sole unu el ili en Olomouc. Sed li trovis helpantojn, kiuj hontante, ke el la ĉeĥa literaturo estis preskaŭ nenio tradukita, eldonadis siajn tradukojn sub la firmo de MEP, volante mem resti anonimuloj. Tion ni klarigas, por ke almenaŭ la ĉeĥa samideano ne estu mistifikata. Samideane salutas vin viaj sindonaj Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, la 2-an de decembro 1946.«

Mi volonte plenumas mian devon kaj represigas la korektigan informon.
Dr T. Pumpr.

Kroniko enlanda

Unua postmilita propagandilo ĉeflingva aperis en decembro. Ĝi estas 8-a eldono de flugfolio verkita de H. K. Bouška titolita »Esperanto-unueca lingva ligilo de nacioj«, kiu en 18 alincoj klarigas argumentojn por Esperanto. Al ĝi estas aldonita dua eldono de »Mallonga enkoduko en Esperanton«, kiu tre klare redonas sur du paĝoj la kompletan strukturon de Esperanto. Ni eldonis tiujn tekstojn, oni povas diri jam klasikajn, kompletigitajn per novaj aldonoj kaj klarigoj, kaj vendas ilin po 1 Kčs. La flugfolioj havas 4 paĝojn de nia gazet-formato. Ni tre rekomendas precipe al ĉiuj lokaj grupoj mendi kaj sendadi ilin al taŭgaj adresoj en siaj lokoj. 10 ekz. 8 Kčs, 100 ekz. 70 Kčs, 1000 ekz. 600 Kčs afrankite.

Ricevebla ĉe nia Libroservo (J. Šustr en Praha I, Benediktská 11).

*

Ligo de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio havis restariĝan kunvenon la 19-an de septembro 1946 en paroĥejo ĉe sankta Apolinario en Praha II. Prezidis fraŭlino L. Dandová, kiu rememorigis mortintajn liganojn: Antonín Dolák kanoniko en Spišské Vlachy, Jan Mašek paroĥestro el Stupno, Dro Jos. Kupka, episkopo en Brno, Dr Josef Hewera profesoro. Estis

elektita prezidanto Pastro Josef Pašek. Honora prezidanto estis elektita helpespiskopo en Praha Dro Eltschkner. Minimuma jarkotizo de membro estas 25 Kčs. Ĉiuj membroj estos abonatoj de IKUE-organo Espero katolika (60 Kčs po jare). Nova adreso de la Ligo: Praha II, Apolinářská 10.

*

Prelego de Ota Ginz pri Ĉeĥoslovakio en Londono. Nia fidela membro kaj antaŭ la milito multjara ĝenerala sekretario kaj vicprezidanto estis dum pasintaj semajnoj pro profesiaj aferoj en Londono kaj uzis la okazon por prelegi la 25-an de oktobro pri nia respubliko en la Londona klubo. Li kunportis por tiu celo propagandan materialon pri niaj lando kaj kulturo, kiun li disdonis post la prelego, kaj filmon, kiun li projektis. Li spertis ĉe tiu okazo ĝojigan renkontigon. Alparolis lin sinjorino Crolenbaum, kiun li instruis Esperanton en la jaro 1921 kiel fraŭlinon Žofie David. La prelego estis aŭskultata kun grava intereso. La multfaka sperteco de Ginz ebligis al li doni informojn fidindajn kaj utilajn same por nia patrujo kaj por la Londonanoj.

*

Regiona kunveno en Plzeň. La V. regiono (peranto s-o Fr. Kavan) kun Okcident-Bohemiaj Esperantistoj kaj La Kulturo aranĝis en Měst. Beseda la 14 decembron honoran memordeservon, je la 87 naskiĝtago de nia majstro, kiun partoprenis 52 ĉeestantoj, invititaj el ĉiuj niaj 13 distriktoj de la regiono. El la centra komitato ĉeestis presidanto A. Malík kaj regionaj komitatanoj vicperanto Jos. Patera kaj Jos. Hylak el Plzeň, s-o Rudolf Petr Nepomuk, s-o J. Krysl, direktoro el Planá u Mar. Láz. kaj D. Valtr el Stribro; ĉiuj interesiĝis pri regiona gvidado kaj promesis sindoneme kunlabori. Pri etika sukceso eksterlanda de nia radioelsendado parolis s-o A. Malík, pri la evoluo de esp. libro parolis s-o Josef Patera, pri la vivo de Zamenhof parolis s-o F. Kavan. En riĉa programo muzikis s-ino Perlíková kaj f-ino Holá kaj multajn poemojn deklamis s-oj Reiser, Treška, Zíka kaj Kroupa. Solena vespero multe entuziasmigis ĉiujn gesamideanojn kaj montris ke ili volas subtenadi nian movadon.

ESPERANTISTA VIVO.

Al s-ro *I. ĝ. Jaromír Rebiček*, regiona peranto en H. Brod, naskiĝis la 18-an de oktobro 1946 filo *Dalibor*. La junaj geedzoj akceptu bondezirojn por si kaj por la filo.

RADIO PRAHA.

La esperanto-elsendoj daŭras regule ĉiun *lundon* kaj *ĵaŭdon* je la 22.50 h MET per ondo 470 m. Iliaj temoj en la lasta tempo estis la jenaj. (Tralegu kaj verku ankaŭ ion konvenan; se vi ne povos mem paroli, samideanoj de Praha anstataŭos vin volonte.)

1. VII. Jechout: Jan Hus kaj lia epoko
4. VII. Hromada: Radio-revuo julia
8. VII. Malík: La nova registaro ĉekoslovaka
11. VII. Víttek: Svedio kiel mi ĝin vidis
15. VII. Malík: La dujara rekonstrua plano
18. VII. Glud-Kopenhago: Impresoj de dano en ĈSR
22. VII. Echtner: Somera agado de niaj grupoj
25. VII. Hromada: Bikini kaj Karel Čapek
29. VII. Hromada: Rememoroj pri la 13. Universala Kongreso 1921 en Praha
 1. VIII. Hromada: Radio-revuo aŭgusta
 5. VIII. Špür: Filmo de teruro (Lidice)
 8. VIII. Malík: Somera kursaro en Doksy
 12. VIII. Šimon (Mařík): Iom el la historio de la universitato de Praha
 15. VIII. Hromada: Esperanto en la eŭropa radio Ledo kaj gumo - industrio ĉekoslovaka
 19. VIII. Mařík: La II. int. studenta kongreso en Praha
 21. VIII. Praha II. 21.35: Hromada: La naciigita industrio sin prezentas
 23. VIII. neniŭ elsendo
 26. VIII. Jong-Slanina: Intervjuo kun nederlanda redaktoro
 29. VIII. Malík: Datreveno de la slovakia revolucio
 2. IX. Šimon (Mařík): Terposedaj reformoj en ĈSR
 5. IX. Hromada (Mařík): Radio-revuo septembra
 9. IX. Malík: Ekspozicio de ĉs. pentristoj en Svislando
 12. IX. Mastná (Malík): Natur- kaj best-protekto
 16. IX. Paleček: Ĉs. metio en la Foiro de Praha
 19. IX. Malík: Unu jaro de nia radio-laboro
 21. IX. Praha II.: Hromada: Mi vidis la Foiiron en Praha
 23. IX. Episkopo Dr Novák: Pri la ĉekoslovaka eklezio

26. IX. Slanina: Kio estas URO-labor-lernejoj
30. IX. Hromada: Esperanto-ekzamenoj en Praha
 3. X. Hromada: Radio-revuo oktobra
 7. X. Šimon (Slanina): Ĉekoslovakaj lernejoj
 10. X. Malík: Smetana en Svedio antaŭ 90 jaroj
 14. X. Hromada: Ĉu vi scias kio estas SOKOL
 17. X. Malík: Jubileaj koncertoj de la ĉs. radio
 21. X. Baďura (Mařík): Travivaĵoj de ĉs. esperantisto-soldato en la oriento dum la milito
 24. X. Malík: La signifo de la nunjara 28. X.
 27. X. Solena artoprograma duonhoro okaze de la Ĉekoslovaka Tago de la Sendependeco. Preparis, tekstojn kaj versojn tradukis Dr Tomáš Pumpr (vidu specialan artikolon)
 31. X. Rabochová-Hromada: Intervjuo pri la ĉs. partopreno en la Internacia konkurso de muziko kaj kanto en Genevo
 4. XI. Jechout: La signifo de la batalo sur Blanka Monto
 7. XI. Hromada: Radio-revuo novembro
 11. XI. Malík: Mikrofotografio
 14. XI. Hromada: Pri la eĥo de niaj disaŭdigoj
 18. XI. Raymond Schwartz Parizo intervjuata de Mařík. Recitas sian novan poemon Gastejo ĉe la vojo
 21. XI. Malík: Pri la ĉefministro Klement Gottwald (50 jara)
 25. XI. Dr Unger Zúrich: Impresoj de svisa ĵurnalisto en ĈSR
 28. XI. Rabochová recitis Maryčka Magdonová kaj Ruĝa floro de Petr Bezruč. Enkondukaj vortoj: Hromada
 2. XII. Malík: Semajno en Ĉekoslovakio
 5. XII. Hromada: Radio-revuo decembra
 9. XII. Malík: Semajno en ĈSR
 12. XII. Šimon: Kristnaskaj kutimoj en ĈSR
 16. XII. Malík: Semajno en ĈSR
 19. XII. Nývlt: Juna studento-kvincenta membro klubas parolas
 23. XII. Dr M. Novák, episkopo de la ĉekoslovaka eklezio: Pacon al vil
 26. XII. Malík: Respondo al radio Budapeŝto
 30. XII. Eliášová-Valeš: Intervjuo kun Sta Silvestro (verkis A. Slanina)

Nia unua artoprograma duonhoro

estis elsendata la 27-an de oktobro, de la 23a ĝis la 23.30 horo, okaze de la ĉekoslovaka nacia festotago. La programon preparis, la tekstojn kaj versojn tradukis Dro Tomáš Pumpr. Interpretis ĝin du membroj de la iama Verda Stacio Brno: s-ino *Zdeňka Švabíková-Kožíková*, nun membro de Urbaj Teatroj de Praha, s-o *Karel Höger*, nun membro de la Nacia Teatro en Praha, plue kantis s-ino *Marie Budíková*, membro de la Nacia Opero en Praha, kaj *Bedřich Bobek*, membro de la dramaktora grupo de Radio-Praha. Vorte akompanis *Rud. Hromada*, reĝisoro estis *Josef Bezdiček*, iam reĝisoro de la Verda Stacio, nun ĉefreĝisoro de Radio-Praha.

En la programo estis: Fragmento pri la efektiva amo al la nacio, el Interparoloj kun Tomáš Garrigue *Masaryk* (legis Bobek), la poemo de Jan *Neruda*: Plue, nur plue (*Švabíková-Pech*), fragmento el la Raportajo skribita en la maŝo de pendigilo de Julius *Fučík* (*Höger*),

ario pri alauda el la opero *La kiso*, de Bedřich Smetana (Budíková), kaj la poemo »Ni estis kaj estos« de J. V. Sládek (Höger). La programo estis malfermita per la himno *La Espero* (disko de Infanĥoro Bakule 1927) kaj finita per la ĉekoslovaka himno. Inter la tekstojn oni metis: Fragmenton el la opero *La vendita fianĉino* de Bedřich Smetana (Kial ni ne ĝoju, se sannon donas Di!), marŝo *En la novan vivon* de Josef Suk, kaj finparton de la nova verko de Otakar Jeremiáš, komponita laŭ vortoj del poemo: Kanto al la patrolando de Josef Hora.

La aŭskultinto konstatu kun ĝojo sincera, ke la voĉoj de ĉiuj legantoj, kantantoj kaj deklamantoj estis voĉoj de spertaj profesiaj aktoroj, sed ke ĉiuj enmetis en siajn tekstojn sinceran volon esprimi sentojn de la aŭtoroj kaj la siajn. La homa voĉo estas ilo mirinda: ĝi redonas la senton de la parolanto, sed ĝi estas ilo mirakla. Pardonu al la humila aŭskultinto de voĉoj tre multaj. La homa voĉo tre malfaciligas trompon. Aŭskultante atente, vi aŭdas, ĉu la parolanto, deklamanto, oratoranto, kredas sincere tion, kion li diras. La temoj de la duonhoro estis ĉiuj patriotaj en la plej bona senco de la vorto: ili ĉiuj proklamis fidon al interna ideo de sia nacio samtempe kredigante, ke ankaŭ ceteraj nacioj posedas ideojn samvalorajn. Kaj neniu el la aktorantoj mensogis. Pardonu tiun laŭdon al la homo kortuŝita! Estas ĉarmo de disaŭdigaj programoj, ke oni aŭdas sole la voĉojn, kiuj malpli povas kaŝi ol la homa mieno. Kaj la voĉo de komentarianto,

kiu estas diletanto, ne tro diferencis de voĉoj profesionalaj.

La duonhoro vekis agrablan surprizon inter la aŭskultantoj de Radio-Praha. Laŭdaj kaj kontentaj leteroj venis multaj, ankaŭ ĉekoslovakaj samideanoj tiun ĉi fojon esprimis dankon al la direkcio de la stacio kaj la aktorantoj en pli granda nombro.

La »radio-stabo« esperantista klopodas, ke tiaj duonhoraj estu elsendataj ĉiumonate.

Ŝanĝoj en Radio Praha.

Komencante la 2. de januaro Praha ne plu elsendas la 30 minutan programon je la 21-a horo MET. Anstataŭ tio estas elsendataj

du programoj ĉiutage po 15 minutoj.

1. Je la 19-a horo MET (egalas al 18-a vintra horo ĉs.) sur ondoj 31,41 m kaj longa 1961 m.

2. Je la 23-a horo MET sur la ĝisnuna ondo 49,92 m.

La programoj estos pliriĉigataj. Krom la kutimaj tag-informoj oni elsendos raportojn kulturajn kaj ekonomiajn, bendo-programojn artajn aj literaturajn. Sabato kaj dimanĉo estos dediĉataj al literaturo esperanta kaj ĉeĥa kaj al esperanto-movado.

Ĉeĥoslovakaj samideanoj, aŭskultu je la 18-a ĉs. tempo per ondo 1961 m!

Ĉiujn proponojn, materialojn, kritikojn kaj dezirojn sendu al Esperanto-servo de Radio-stacio Praha XII, Stalinstrato 12.

Krom la Universala Kongreso en Bern okazos en j. 1947 ankoraŭ KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT)

en Aarhus (Danlando) la 2—7-an de aŭgusto.

La kongreso okazos en Folkets Hus (popola domo).

Kotizo: 13 danaj kronoj por SAT-ano, 16 kronoj pro ne-SAT-ano. Por frualiĝontoj (antaŭ la 1-a de junio) 10 kronoj kaj 13 kronoj danaj.

La kotizojn sendu al la SAT-peranto Josef Patera en Plzeň, Dvořákova 42.

Por la jaro 1947:

Kotizo de Esperanto-Asocio en ĈSR Kĉs 70.—

Kotizo de Membro-Abonanto IEL Kĉs 100.—

Abonpago de provizore duonmonata Heroldo de E. Kĉs 100.—

Abonpago de Internacia kulturo (Sofia) Kĉs 110.—

Sendu al Esperanto-Asocio en Praha 47 per pagilo de poŝta ŝparkaso Nro 9.602.

KIE KUNVENAS ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO:

Liberec	mardo, 20 h.	hotelo Imperial.
Pardubice	merkredo, 20 h.	hotelo Veselka.
Plzeň (Kulturo)	ĵaŭdo, 20 h.	rest. Hahn, Houšková 17.
Ústí n. L.	ĵaŭdo, 20 h.	reg. ofic. de Informministerio str. Velká hradební.

K tomuto čísle, jímž končí prvý ročník, jsou přiloženy složenky. — Račte jich použít k placení příspěvků nebo předplatného na časopisy. — Udejte vždy účel platby! Složenky nezahazujte! — Prvé číslo nového roč. vyjde počátkem února.

ESPERANTISTA.

Revuo por Esperanto-Movado en ĈSR. Orgán svazu esperantistů ĈSR. (V Praze 47). Vychází měsíčně. Roční předplatné Kĉs 60,— platte složenkou psp. čís. 9.602! S členstvím Svazu Kĉs 70. *Veškeru organizační korespondenci zasílejte gen. sekretáři p. B. Palečkovi v Praze II, Podskalská 49.*

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel, a nakladatel Svaz esperantistů ĈSR v Praze 47. Redaktor Dr. Stan. Kamarýt. Ročně 70 Kĉs s členstvím. Bez členství 60 Kĉs. Tiskem Jar. Strojila v Přerově. Účast na poštovní novinové službě povolena ředitelstvím pošt v Brně čís. jedn. IA-4-2370-0/37132 15. 3. 46. Doblédací poštov. úřad Přerov 2.

Ce fino de la jaro ni esprimu la dankon al tiuj, kiuj helpis nin en tasko nefacila: informi regule nian membraron kaj ĉefan legantaron pri aktualaj celoj kaj pri samtempa stato de nia movado. Ni tion faris aperigante nian revuon preskaŭ ĉiun monaton, kiom tion ebligadis la presejo tro ŝarĝita. Ni aperis eĉ dum la libertempo. Tio ebligis, ke depost fino de marto, kiam aperis nia unua numero (spite la daton de la 1-a de marto, kiam ni forsendis la korekturojn), ni povis aperigi 10 numerojn, el kiuj sole du estas kunigitajn en unu kajero. La lasta numero estas datumita la 31-an de decembro 1946.

La nombro de kurlaborantoj estis treege malgranda. Tiom pli varma estas nia danko al tiu ĉi areto. Krom la aŭtoroj de la artikoloj estu tie ĉi nomitaj samideanoj Fr. Slavík, kiu administras nian revuon kaj krom tio sciis doni al ni multajn tre utilajn instigojn kaj konsilojn. Rudolf Hromada, kiu plurfoje korektis kaj ellaboris tradukojn de la taskoj, Vuk Echtner, kiu kolektas kaj redaktas materialon por Lokaj informoj, Jar. Mařík kiu liveras materialon por la Kroniko enlanda.

La ĉefaj artikoloj estas destinitaj al ĉefa legantaro. Ili trovis plurfoje resonon tre rimarkindan. Sed por ke ili povu pli efiki, estas bezone, ke nia revuo estu pli legata ankaŭ de ne-esperantistoj. Tial ni ankaŭ sur tiu ĉi loko ripetas nian peton, ke la lokaj grupoj kaj aktivuloj abonigu ĝin al la publikaj legejoj en sia loko, ke ili petu ĝin en kafejoj kaj simile. Tio estas grava tasko de lokaj grupoj. Sed ne venu al ni kun proponoj, ke ni sendu nian revuon senpage al tiuj legejoj! Tion ni ne povas, ni ja havas tro malgrandan nombron de abonantoj kompare kun la granda bruo, kiun faras emfazaj vortoj de kelkaj niaj membroj. Ni eĉ aŭdas bruajn »plendojn« de samideanoj el dekmilaj urboj, kie estas du pagintaj membroj. Ili plendu unue pri si mem.

La esperant-lingvaj artikoloj prezentas parte tradukaĵojn beletristikajn, parte raportas pri temoj ĝenerale interesaj. Ni fidas firme, ke ĝi estas materialo, kiu meritas relegon; tial ni aldonas al tiu ĉi numero titol-paĝon kaj tabelon de enhavo konsilante al aktivuloj konservi la jarkolekton por uzo en la jaroj venontaj. La lokaj grupoj nepre anmetu ĝin en sian bibliotekon.

Lokaj informoj, ekzemple, ankaŭ ne estas skribataj kaj presataj sole por bezono de momento. Tial ni klopodas enpresi sole tion, kio efektive okazis, kaj evitas presi informoj, ke »oni« intencas kurson »malfermi«. La Lokaj informoj volas esti kroniko fidinta de nia podetala laboro.

Kroniko enlanda enhavas informojn pri tiuj okazintaĵoj en nialanda movado, kiuj havas pli vastan intereson kaj meritus atenton ankaŭ inter esperantistoj en landoj ceteraj. La rubriko estis efektive legata, tamen ni atendis pli grandan resonon, kiu versimile venos en la nova jaro.

Esperanto en fremdlando, skribata ĉefe, informas pri gravaj okazintaĵoj ekster nia lando. Ĝi ne povis esti sufiĉe ampleksa, ĉar ni ne volas reporti pri bagatelaĵoj por ne-esperantisto. Al li certe ne imponus informo, ke okazis jarkunveno kun cent partoprenintoj aŭ ke okazis ie libertempejo aŭ kursaro. Kaj faktoj gravaj por la ĉefa leganto, ne okazis multaj. La movado nun ankoraŭ ne vivas tro intense kaj impete. Ĝi ankoraŭ en multaj landoj vivas sole en grupoj kaj asocioj pure esperantistaj. Tion vaste, kiom estas la publiko influata ĉe ni per ĉiutagaj *radio-disaŭdigoj* en Esperanto, okazas nenie en la mondo. Ilia resono estas por ni *ne propagando, sed pruvo*, ke ekzistas en ĉiuj landoj esperantistoj dezirantaj laŭveran informon pri la ceteraj landoj. Tio estas por ni argumento por plua laboro.

Al ĝi ni volas dediĉi nian forton ankaŭ en la venonta jaro kaj invitas vin ĉiujn elkore kaj insiste persisti.